Petro Arŝinof

La du Oktobroj

Kultura Societo ***Interhelpo***

Suplemento

al

El liberecana vidpunkto

2

2010a setembro
Gazeto el neantaŭvidebla eldonofteco
Eldonas: Kultura Societo *Interhelpo*
Retpoŝto: interhelpo@gmail.com
Laŭleĝa deponnumero: B-32995-2010

ARCHINOV, Piotr: «Les deux Octobre», *Dielo Truda* (oktobro 1927)
Esperantigo de Jurgo Alkasaro, 2010

2010

Kultura Societo *Interhelpo*
Carretera d'Esplugues, 46
ES-08940 Cornellà de Llobregat

La du Oktobroj

Petro Arŝinof

La sukcesinta kamparana kaj laborista revolucio de la 1917a restis laŭleĝe registrita en la bolŝevista kalendaro kiel «Oktobra Revolucio». Ĉe tio estas parta vero, tamen tio ne estas tute ekzakta.

Je oktobro de la 1917a la laboristoj kaj kamparanoj de Rusio forigis kolosan barilon al la disvolvo de sia revolucio. Ili aboliciis la noman povon de la kapitalistaj klasoj, sed antaŭ ol tio ili atingis ion revolucie samgravan aŭ eble eĉ pli fundamentan, kiam ili forprenis la ekonomian povon al la kapitalistaj klasoj: la grundon al la grandaj bienuloj ĉe la kamparo, la rajton labori libere kaj nekontrolite ĉe la urbo, okaze ne la tutan kontrolon sur la fabrikoj. Sekve, estis ja antaŭ ol oktobro, kiam la revoluciaj laboristoj neniigis la bazon de la kapitalismo. El ĝi restis nur la politika superstrukturo.

Se tiu ĉi ĝenerala tutlanda senpropriigo al la kapitalistoj fare de la laboristoj ne estus okazinta, detruante la burĝan ŝtatan maŝinon, la politika revolucio ne estus sukcesinta tiel kiel sukcesis, eble ĝi eĉ ne estus sukcesinta entute, ĉar tiam la rezistado de la proprietuloj estus estinta multe pli povohava.

Aliflanke la celoj de la socia revolucio je oktobro ne limiĝis renversi la kapitalistan povon. La laboristoj celis longan periodon de praktikaj realigoj, de socia memmastrumado kaj de socialista konstruo, sed ĝi estis fiaskonta je la tujvenontaj jaroj. Sekve, se oni pritaksas entute la disvolvon de la rusa socialista revolucio, Oktobro aperas kiel nura fazo –kvankam certe kiel findecida kaj povoplena.

Jen kial Oktobro sola ne prezentas entute la socian revolucion. Nepras kalkuli pri tiu ĉi cirkonstanco, findecida ĉe la rusa socia revolucio, kiam oni pensas pri la sukcesoplenaj tagoj de Oktobro.

Alia karakterizaĵo, ne malpli grava, de Oktobro estas, ke ĝi enhavas du signifojn –tiun, kiun donis al ĝi la laboristaj amasoj partoprenantaj la Socian Revolucion kaj kun ili la anarĥikomunistoj, kaj tiun, kiun donis al ĝi la partio, kiu forprenis la

povon deire el tiu ĉi aspirado al la socia revolucio, kaj kiu perfidis kaj sufokis perforte ties postan disvolvon.

Ega abismo estas inter tiuj ĉi du Oktobro-interpretadoj.

La laborista kaj kamparana Oktobro estas la neniigo de la povo de la parazitaj klasoj je la nomo de la egaleco kaj la memmastrumado. La bolŝevista Oktobro estas la konkero de la povo fare de la klerulara revolucia partio, la starigado de ĝia ŝtata «socialismo» kaj de ĝiaj «socialistaj» rimedoj regi la amasojn.

La laborista oktobro

La Revolucio de Februaro trafis la diversajn revoluciajn partiojn je plena konfuziĝo, kaj sendube ili estis plensurprizataj de la profunda socia karaktero de la naskiĝanta revolucio. Unue neniu volis kredi tion krom la anarĥiistoj. La Bolŝevista Partio, kiu ĉiam vantis esprimi la plej radikalan aspiron de la laborista klaso, ne taŭgis preterpasi ĉe siaj celoj la limojn de burĝa revolucio.

Ĝis la aprila konferenco ili ne sin demandis, kio okazis reale en Rusio. Ĉu tio estis nur la faligo de la carismo aŭ estis transiranta revolucio –ĉu tiel malproksimen kiel al la neniigado de la kapitalismo?

Tio starigis antaŭ la bolŝevistoj la demandon pri la sekvenda taktiko. Lenino ekkonsciis antaŭ ol aliaj bolŝevistoj pri la socia karaktero de la revolucio kaj emfazis la bezonon konkeri la povon. Li vidis decidan apogilon ĉe la laborista kaj kamparana movado, kiu estis subfosanta pli kaj pli la bazojn de la industria kaj agra

burĝaro. Unuvoĉan kunsenton pri tiuj demandoj oni ne povis atingi eĉ dum la oktobraj tagoj de la 1917a. La partio manovris senĉese inter la sociaj agvortoj de la amasoj kaj la koncepto pri socidemokrata revolucio, el kiu ĝi estis kreata kaj disvolvata.

Sen kontraŭi la celon pri Konstitucia Asembleo de la eta kaj granda burĝaro, la partio streĉiĝis por kontroli la amasojn, klopodante elteni ilian paŝon, kiu estis ĉiam pli rapida. Dume la laboristoj marŝis impete antaŭen, post redresi iliajn povohavajn dorsojn, forfaligante senkompate, post la renverso de la carismo, siajn malamikojn ĉu dektrajn aŭ maldekstrajn kaj marŝis maltime al sia sukceso. La grandaj bienuloj komencis evakui la kamparon, fuĝante antaŭ la ribela kamparanaro kaj serĉante la protekton por siaj proprietoj kaj personoj ĉe la urboj, ĉar la kamparanaro faris rektan redisdonadon de la grundo kaj ne volis eĉ aŭdi pri paca kunloĝado aŭ kunestado kun la bienuloj.

Ĉeurbe ankaŭ okazis «subita ŝanĝo ĉe la rilatoj» inter laboristoj kaj entreprenistoj. Danke al la streĉo de la kolektiva genio de la amasoj, laboristaj komitatoj stariĝis en ĉiuj entreprenoj: fabrikoj, transportoj, ercoj..., intervenante rizolute la produktadon, malgraŭ la admonoj de la mastroj kaj cele al ilia flankenigo el la produktado.

Tiel ĉe ĉiuj lokoj de la lando la laboristoj komencis la kolektivigon de la entreprenoj. Samtempe sur la tuta laborista revolucia Rusio etendiĝis reto de laboristaj kaj kamparanaj sovetoj, kiuj ekfunkciis kiel memmastrumaj organoj. Ili disvolvis, daŭrigis kaj defendis la revolucion.

La kapitalista ordo kaj povo ankoraŭ ekzistis laŭnome ĉe la lando, tamen la ampleksa sistemo de laborista ekonomia kaj socia memmastrumado aperis kaj disvolviĝis paralele.

Tiu reĝimo de sovetoj kaj fabrikaj komitatoj per la nura fakto de sia ekzisto minacis mortige la ŝtatan sistemon. Estas

klarigenda, ke la naskiĝo kaj disvolvo de la sovetoj kaj fabrikaj komitatoj havis nenion komunan kun aŭtoritatemaj principoj.

Plenkontraŭe ili estis, je la prava senco de la vortoj, organoj pri socia kaj ekonomia memmastrumado de la amasoj kaj neniel organoj de la ŝtata povo. Ili kontraŭstaris la ŝtatan maŝinaron, kiu serĉis direkti la amasojn, kaj pretigis findecidan batalon kontraŭ ĝi.

«La uzino por la laboristo, la grundo por la kamparano» –tiuj ĉi estis la agvortoj, kun kiuj la revoluciaj amasoj de la urboj kaj la kamparo partoprenis la fiaskigon de la ŝtata maŝinaro de la posedantaj klasoj, je la nomo de nova socia sistemo surbazita sur la fabrikaj komitatoj kaj sociaj kaj ekonomiaj sovetoj kiel bazaj kernoj.

Tiuj ĉi postuloj trakuris la tutan laboristan Rusion kun grava influo sur la direkta agado kontraŭ la registara koalicio socialista-burĝara.

Kiel klarigite, la laboristoj kaj kamparanoj jam estis rekonstruantaj la insdustrian kaj agran sistemon de Rusio antaŭ ol oktobro de la 1917a. La priagra demando estis praktike solvita de la malriĉaj kamparanoj je junio-setembro de la 1917a.

La urbaj laboristoj siaflanke ekfunkciigis memmastrumajn sociajn kaj ekonomiajn organojn, kiuj forprenis la organizajn funkciojn sur la produktado al la ŝtato kaj al la proprietuloj. La laborista oktobra revolucio neniigis la lastan kaj plej gravan barilon al la disvolvo de ilia revolucio: la ŝtatan povon de la posedantaj klasoj jam venkitaj kaj malorganizitaj.

Tiu lasta evoluo malfermis ampleksan horizonton por la atingo de la socia revolucio, envojigante ĝin tra la kreiva vojo al la socialista rekonstruado de la socio, al kiu jam celis la laboristoj dum la antaŭaj monatoj. Jen la laborista kaj kamparana Oktobro.

Ĝi signifis povoplenan klopodon de la troekspluatitaj permanaj laboristoj detrui ĝisfunde la bazojn de la kapitalista socio kaj konstrui laboristan socion surbazatan je la principoj de egaleco, sendependo kaj memmastrumado de la urba kaj agra proletaro. Tiu ĉi Oktobro ne atingis sian naturan plenumiĝon. Ĝi estis perforte interrompata de la Oktobro de la Bolŝevista Partio, kiu iom post iom disvastigis sian diktatoradon tra la tuta lando.

La Oktobro de la Bolŝevista Partio

Ĉiuj ŝtatistaj partioj, eĉ tiu bolŝevista, limigis la rusan revolucion al la instaŭracio de socialdemokrata reĝimo. Nur kiam la laboristoj kaj kamparanoj de la tuta Rusio komencis fortike svingi la bienula-burĝan ordon, kiam la socia revolucio montriĝis neinversigebla historia fakto, tiam la bolŝevistoj komencis diskuti la socian karakteron de la revolucio kaj modifi sekve sian taktikon. Ne estis unuvoĉecon ĉe la partio sur la demandoj pri karaktero kaj orientiĝo de la tiamaj okazintaĵoj, eĉ ne en oktobro mem.

Ankoraŭ plu, la Oktobra Revolucio kaj la okazaĵoj, kiuj sekvis ĝin, disvolviĝis dum la Centra Komitato de la Partio estis dividata en du kontraŭstarantaj tendencoj. Dume parto de la Centra Komitato kun Lenin ĉekape antaŭdivis la neevitindan socian revolucion kaj proponis la pretigadon por la povopreno, la alia tendenco ĉefita de Zinoviev kaj Kamenev denoncis la socian revolucion kiel aventureman kaj ne preterpasis la starigadon de konstitucia asembleo, en kiu la bolŝevistoj okupus la pli maldekstrajn postenojn (vidu TROCKIJ: *La Oktobraj instruoj*).

La Lenina vidpunkto venkis kaj la Partio komencis mobilizi siajn fortojn por la eblo de findecida amasa lukto kontraŭ la provizora registaro.

La Partio sin ĵetis en la kurenton de la fabrikaj komitatoj kaj la sovetoj de laboristaj delegitoj, ili faris sian plej bonan por akiri kiom pli eble da postenoj ĉe tiuj ĉi memmastrumaj organoj, ankoraŭ

senspertaj, cele de kontroli ties agojn. Tamen, la konceptado kaj alproksimiĝo de la Bolŝevista Partio al la sovetoj kaj al la fabrikaj komitatoj estis funde malsimila ol tiu de la amasoj.

Dume la laborista amaso taksis la sovetojn kaj la komitatojn de fabrikoj kaj laborejoj, kiujn ĝi mem starigis, kiel sociajn kaj ekonomiajn memmastrumajn organojn, la Bolŝevista Partio rigardis ilin kiel ilojn por forpreni la povon al la kaduka burĝaro kaj poste uzi tiun ĉi povon laŭ la doktrino de la Partio.

Sekve montriĝis egan diferencon inter la revoluciaj amasoj kaj la Bolŝevista Partio pri iliaj Oktobraj konceptadoj kaj perspektivoj.

Ĉe la unua okazo temis pri la renverso de la povo cele de ampleksigi kaj fortigi la jam starigitajn laboristajn kaj kamparajn memmastrumajn organojn. Ĉe la dua okazo temis pri sin apogi sur tiuj ĉi organoj cele al la povopreno kaj la subigo de ĉiuj revoluciaj fortoj al la Partio.

Tiu ĉi malkonverĝo, ni vidas tion, estis ega. Ĝi pligrandiĝis rapide dum la tuta posta kurso de la rusa revolucio, ĉe kies sorto ĝi ludis fatalan rolon. La sukceso de la bolŝevistoj en la Oktobra Revolucio –tio estas, la fakto esti ĉe la povo, el kie ili subigis la tutan revolucion al la partio– estas klarigebla per ilia lerteco anstataŭigi per la ideo pri soveta povo la socian revolucion kaj la amasan socian emancipadon, per artifiko de ĵonglisto.

Dekomence tiuj du ideoj ŝajnas ne kontraŭantaj, tial ke eblas kompreni la «sovetan povon» kiel la povon de la sovetoj kaj tiel estis faciligata la anstataŭigon de la revolucio per la ideo pri soveta povo.

Tamen je ilia realigo kaj laŭ iliaj sekvoj tiuj ĉi ideoj kontraŭis perforte. La koncepto pri soveta povo personigita je la bolŝevista ŝtato aliformiĝis al plentradi-

cia burĝa povo koncentriĝinta en manpleno el uloj, kiuj subigis al sia aŭtoritato ĉion fundamentan kaj povoplenan je la vivo de la popolo: ĉi-okaze la socian revolucion. Helpe de la «la povo de la sovetoj», kie la bolŝevistoj monopolizis preskaŭ ĉiun postenon, ili atingis totalan povon kaj povis proklami sian diktatorecon sur la tuta revolucia lando.

Tio donis al ili la eblon sufoki ĉiujn laboristajn revoluciajn kurentojn ne konsentantajn kun ilia doktrino, la eblo aliigi la tutan kurson de la rusa revolucio kaj akceptigi al ĝi amason da decidoj kontraŭantaj ĝian esencon.

Unu el tiaj decidoj estis la militistigo de la laboro dum la jaroj de la milita komunismo –militistigo de la laboristoj por ke milionoj da oportunistoj kaj parazituloj estu vivintaj je paco, lukso kaj neniofarado. Alia decido estis la lukto inter la urbo kaj la kamparo okazigita de la partia politiko, kiu taksis la kamparanojn kiel ne fideblajn kaj eksterrevoluciajn elementojn. Ankaŭ okazis finfine sufokado de la liberecana penso kaj de la anarĥiista movado, kies sociaj ideoj kaj agitvortoj estis la forto de la rusa revolucio kaj orientis ĝin al la socia revolucio. Aliaj decidoj estis la proskribo de la sendependa laborista movado, la sufoko de la laborista gazetara libero kaj de la esprimlibero de la laboristoj je ĝenerale. Ĉio koncentriĝis al unusola centro, el kie emanis ĉiujn instrukciojn koncerne al la viv-, pens-, agformo de la laboristaj amasoj. Jen, kio estas la bolŝevista Oktobro.

Ĝi enkarniĝis la idealo, kiun persekutis dum jardekoj la socialista revolucia intelektularo, fine realigita nun de la diktatureco de la Tutrusa Komunista Partio. Tiu idealo kontengigas la regantan intelektularon, malgraŭ ĝiaj katastrofaj sekvoj por la laboristoj; nun ili povas pompe festi la datrevenon de sia deka jaro sur la povo.

La anarĥiistoj

La revolucia anarĥiismo estis la nursola socipolitika kurento, kiu ekzaltis la ideon pri socia revolucio antaŭ la laboristoj kaj kamparanoj, tiel dum la 1905a Revolucio kiel ekde la unuaj tagoj de la Oktobra Revolucio.

Fakte la rolo, kiun ili povus esti ludintaj, estis tiel kolosa kiel la luktometodoj uzitaj de la amasoj.

Aliflanke neniu alia socipolitika teorio povus miksiĝi pli harmonie kun la spirito kaj la orientiĝo de la revolucio. La paroladoj de la anarĥiistaj oratoroj je la 1917a estis aŭskultataj per aparta fido kaj atento de la laboristoj.

Ŝajnus, ke la revolucia potencialo de la

laboristoj kaj kamparanoj kune kun la ideologia kaj taktika kapablo de la anarĥiismo povintus prezenti forton, kiun nenio povus kontraŭstari. Bedaŭrinde tiu unuiĝo ne okazis.

Iuj izolaj anarĥiistoj faris intensan revolucian agadon inter la laboristoj, sed estis neniu ampleksaganta anarĥiista organizaĵo, kiu aranĝis senĉesan kaj kunordigitan agadon (krom la Konfederacio *Nabat* kaj la Maĥnofŝina en Ukranio).

Nur tia organizaĵo povintus unuigi la anarĥiistojn kaj la milionojn da laboristoj. Dum tiom grava kaj avantaĝa revolucia periodo la anarĥiistoj limiĝis plejparte al la agado de etaj grupoj, ili ne eliris el sia grupetaĉa ŝelo, anstataŭ orientiĝi al la amasa politika agado kaj propagando.

Ili preferis droni en la maro de siaj enaj disputadoj sen eĉ klopodi starigi kaj solvi la demandon pri komuna politiko kaj taktiko de la anarĥiismo.

Kaŭze de tiu mankaĵo ili kondamnis sin al la neagado kaj la sterileco dum la plej ĉefaj momentoj de la socia revolucio.

La kialoj de la katastrofa stato de la anarĥiista movado radikis sendube en ĝia dispersado, malorganizado kaj manko de kolektiva taktiko –kio estis preskaŭ ĉiam starigata de la anarĥiistoj kiel principo–, malebligante ke ili donu eĉ unu solan organizan paŝon por povi orienti findecide la socian revolucion.

Nun havas neniun profiton denonci tiujn, kiuj per sia demagogio, malzorgemo kaj senrespondeco kontribuis krei tiun faktan situacion. Sed la tragika sperto, kiu portis la laboristajn amasojn al la malvenko kaj la anarĥiismon al la abismorando, estu asimilita ekde nun. Ni devas malestime kontraŭbatali kaj stigmatizi senkompate tiujn, kiuj per ia aŭ alia maniero daŭrigas la ĉiamdaŭrecon de la kaoso kaj la konfusiĝo en la anarĥiismo, tiujn, kiuj malebligas ĝian

restarigadon kaj organizadon.

Tio estas, ĉiujn streĉojn de la movado por la laborista emancipiĝo kaj la realigo de la anarĥikomunista socio.

La laboristaj amasoj ŝatas la anarĥiismon kaj estas instinkte allogitaj al ĝi, sed ili ne laboros kun la anarĥiista movado ĝis kiam estu konvinkitaj pri ĝia teoria kaj organiza kohero. Endas, ke ĉiu el ni klopodu maksimume la atingon de tiu kohero.

Konkludoj kaj perspektivoj

La bolŝevista praktiko de tiuj ĉi lastaj dek jaroj montras klare la orientiĝon de tiu povo, ĉiujare ĝi limigas iom pli la sociajn kaj politikajn rajtojn de la laboristoj kaj forrabas iliajn revoluciajn atingojn. Ne estas pridubinde, ke la «historia misio» de la Bolŝevista Partio estas malplena el signifo kaj ke ĝi klopodos porti la rusan revolucion ĝis sia fina celo: la ŝtatkapitalismo de la salajrataj sklavuloj, tio estas, la plifortigita povo de la ekspluatantoj kaj la plialtiganta mizero de la ekpluatatoj.

Kiam ni parolas pri la Bolŝevista Partio kiel partio de la socialista intelektularo, ekzercanta ĝian povon sur la urbaj kaj agraj laboristaj amasoj, ni rigardas ĝian centran regantan kernon, kiu laŭ origino, laŭ instruado kaj laŭ nuna vivstilo havas nenion komunan kun la laborista klaso kaj, malgraŭ tio, regas ĉiujn detajlojn de la vivo de la partio kaj de la popolo; tiu ĉi kerno klopodos elteni sin ĝis ĉiam super la proletaro, kiu rajtas esperi nenion el ĝi.

La ebloj, kiujn oferas la bazaj aktivistoj de la partio, inkluzive de la Komunista Junularo, ŝajnas malsimilaj. Tiu ĉi amaso partoprenis pasive la neajn kaj kontraŭrevoluciajn politikojn de la partio, sed kiel ĝi devenas el la laborista klaso, ĝi kapablas atingi komprenon pri la vera laborista kaj kamparana Oktobro kaj celi al ĝi. Ni ne pridubas, ke el tiu ĉi amaso eliros multaj batalantoj por la laborista Oktobro.

Ni deziras, ke ĝi asimilu rapide la anarĥiistan karakteron de tiu ĉi Oktobro kaj venu je ties helpo; niaflanke, ni faru tion plej eblan por montri tiun karakteron kaj helpi la amasojn rekonkeri kaj konservi la grandajn revoluciajn triumfojn.

***Petro Arŝinof**, je oktobro de la 1927a*

ДА
ЗДРАВСТВУЕТ АВАНГАРД
РЕВОЛЮЦИИ
КРАСНЫЙ ФЛОТ